

La Esperanto-movado plene kapitulacis antaŭ la Homaj Rajtoj

Komento pri la rilato inter Esperanto-movado kaj homaj rajtoj

Kiel la gazetaro de diversaj landoj lastatempe raportis, la stato de la Homaj Rajtoj en la mondo draste malboniĝis en la pasintaj jaroj, praktike en ĉiuj landoj, en kelkaj pli, en aliaj malpli intense. Aktualan analizon de la stato de la Homaj Rajtoj en la mondo regule donas la ĉiujare aperanta Raporto de Amnestio Internacia, kiu pentras ŝokan bildon pri la lezado de la bazaj homaj kaj civitanaj rajtoj en la monda ŝtataro.¹ Krom sennombraj krudaj kazoj, kiuj estas listigitaj en tiu impresa raporto, la homaro pli kaj pli suferas malrespektadon, ignoradon kaj lezadon de la homaj rajtoj ankaŭ en landoj, kiuj ĝis nun grandparte respektis la homajn kaj civilajn rajtojn, ekzemple Pollando kaj Hungario, por nomi du aktualajn eŭropajn ekzemplojn. En tiuj landoj aperis registaroj, demokratie elektitaj de la (ĉu malkontenta?) popolo, kiuj prezentas sin eksplicite naciismaj, ksenofobiaj kaj kontraŭ-liberalaj kaj kiuj kuiras sian propran supon por konservi la potencon (ĉar nur pri tio temas). Preskaŭ ĉiuj orienteŭropaj landoj kontraŭstaras akcepti rifuĝintojn el islamaj landoj kaj konstruas longajn kaj altajn murojn ĉe siaj limoj por protekti sin kontraŭ la timata amasa invado de rifuĝintoj el Sirio, Afganio kaj Afriko, kie la ĝenerala mizero estas senlima kaj neimagebla. Povas esti, ke la socioj en orienta Eŭropo havas seriozajn kialojn por rifuzi rifuĝintojn el tiaj landoj. Ne nur pro la milito, sed ĉefe pro ekonomiaj kialoj al (okcidenta) Eŭropo migras pli kaj pli da homoj el orienta Eŭropo, el Afriko kaj Proksima Oriento, kie la koncernaj landoj riskas ankaŭ civilize dezertiĝi. Kvankam iliaj ĉelimaj bariloj en principo kontraŭas la spiriton de Eŭropa Unio, Bruselo ŝajnas toleri tiujn farojn, kiuj kontribuas al la protektado de la eksteraj limoj. Sed en la Mediteranea Maro dronis miloj da homoj, ĉar iliaj ŝipoj ne eltenis ilian transporton al la bordo de Eŭropo. Tio estas unika skandalo en la historio. Eŭropa Unio, la pacprojekto en si mem, riskas ne nur perdi sian kredindecon, sed ankaŭ disfali en sia konsisto, ĉar parto de la nova elito ŝajne ne plu interesiĝas pri Eŭropa Unio en la nuna formo, kiun la „perfidemaj“ angloj jam forlasis – Dio indulgu ilin. Certe, la monon el Bruselo kaj de la riĉa Okcidento ili ĉiuj volas havi.

Dum kelkaj landoj kiel ekzemple Germanio prezentas sin modela mastro de la krizo (malgraŭ enorma interna kontraŭstaro), klopodante alte teni la normojn de la homaj rajtoj, Ruslando, kiu tamen estas membro de la eŭropa familio, ludas aparte negativan kaj cinikan rolon. Kiel elefanta koloso ĝi paŝas tra la dezerto por detruĝi ĉion, kio kontraŭstaras ĝin. La rusa polico kutimas plek sovaĝe sufoki ĉiujn publikajn protestojn, kiuj estas direktitaj kontraŭ la registaro kaj la oficiala politiko. Laŭ neimageble senskrupula maniero Moskvo akaparis en nokta kaj nebula operaco Krimeon per ruze aranĝita trompa anekso, kiu similis al rabo aŭ ŝtelo de fremda ŝtatteritorio, kiun la plimulto de la monda ŝtataro ne agnoskis. Ĉie kie la rusa potenco aperas kaj instaliĝas – kaj tion oni bone vidis en la pasinteco –, la bazaj liberecoj de la homoj. estas tuj sufokataj – kvazaŭ Ruslando specialiĝis pri tio. Unu el la fatalaj sekvoj de tiu anekso estas la subpremado kaj persekutado de la komunumo de la krimeaj tataroj, kontraŭ kiu Moskvo gvidas malbelan kampanjon, kiu memorigas stalinismajn tempojn.² Samtempe, la rusa propagando lanĉis aĉan kampanion por misfamigi Ukrainion, kiu estis senskrupule deklarita faŝisma ŝtato. Sendepende de la demando, al kiu nuntempa ŝtato Krimeo historie apartenas, por restarigi la normalan staton kaj la pacon Ruslando devas redoni Krimeon al Ukrainio, retiri siajn soldatojn el Donbaso, interpaciĝi kun Kievo kaj senkondiĉe konfirmi la ŝtatan sendependecon de Ukrainio en la limoj de 1991. Nur tiam la Okcidento (kiu eble faris iujn erarojn, sed neniel kulpas pri tiu krizo) pretos nuligi siajn sankciojn, kiuj kondukis Ruslandon en la internacian izoliĝon. Ruslando kaj Turkio, kiuj estas regataj de paranojaj duondiktatoroj kun malicaj

¹ Vd. http://www.planlingvoj.ch/Homajrajtoj_2016.pdf kaj http://www.planlingvoj.ch/Homaj_rajtoj_2014-15.pdf.

² Vd. http://www.planlingvoj.ch/Tataroj_de_Krimeo.pdf.

intencoj, kiuj celas dumvive konservi sian personan potencon, jam estas menciitaj sur la sama nivelo en la nigra listo de subpremado de la civilsocio kaj vekas abomenon en la civilizitaj landoj. Putin kaj Erdogan evidente fariĝis bonaj aliancanoj, kvankam probable ili malfidas unu la alian. Ambaŭ malŝatas precipe kritikajn ĵurnalistojn kaj aktivulojn de sendependaj neregistaraj organizaĵoj (pri kiuj ili asertas, ke ili estas financataj de Usono kaj de la Okcidento). Putin speciale malŝatas estonojn, latvojn, litovojn kaj ukrainojn, Kaczyński malamas rusojn kaj germanojn, Orbán, Fico kaj Zeman malŝatas arabojn kaj islamanojn, kaj ankaŭ ĉe la rumanoj, bulgaroj kaj ceteraj orienteŭropanoj ili ne estas aparte bonvenaj. Erdogan abomenas armenojn kaj kurdojn, Trump, al kiu direktiĝas la tuta internacia atento, provokas la socion per aĉaj frazaĵoj, torditaj faktoj kaj renversitaj intencoj (nature en la nomo de la bono) kaj krude malrespektas nigrulojn, meksikanojn, demokratojn kaj virinojn kiel duarangajn estaĵojn, kiujn oni libere rajtas sekse molesti laŭ maĉisma maniero. Kiel oni vidis, Trump profunde malamas ankaŭ arabojn kaj islamanojn, kiujn li ne plu volas lasi en sian landon, kiu estu lando de blankuloj, kaj li videble suspektas ankaŭ ĉinojn, koreojn kaj aliajn azianojn, kiu celas subfosi la usonajn ekonomion kaj komercon. Terure! Kiuj estas „modernaj” ŝtatestroj, kiuj malŝatas tiom multajn popolojn kaj homojn? La malamo disvastiĝas tra la mondo kun granda rapideco. Al ajna kritiko el Okcidento la cinikaj regantoj de tiuj landoj reagas eĉ per pli kruda perforto kontraŭ siaj civitanoj, kvazaŭ tio persone plezurigus ilin kaj ili volus venĝi sin, misuzante kulpokapojn. En Ĉinio la ĉiopotenca komunisma partio sufokas ĉiujn opoziciajn voĉojn kaj fortojn kaj tiel kolektive subpremas 1,379 miliardon da homoj, kiuj praktike havas neniujn rajtojn krom obei al la komunisma partio kaj politike silenti. La ĉina registaro, kiu ŝajne akapris gigantan potencon, eĉ planas la totalan kontroladon de sia popolo, kaj de la interreto; la ĉina socialismo do fariĝos groteska moderna digitala diktaturo, kiu ne restos sen internaciaj konsekvencoj. Tiaj ŝtatoj, socioj kaj civilizoj neniel povas esti modelo por pozitiva estonteco, eĉ se por la momento tiaj reĝimoj ŝajnas esti allogaj kaj admirindaj, ĉar laŭdire ili garantias stabilecon en rapide ŝanĝiĝanta mondo. Sed ankaŭ tiuj diktaturoj verŝajne iam kolapsos kaj pereos, kiam la tempo maturas por ilia malapero. Pri la konsekvencoj de tia disfalo oni eĉ ne kuraĝas pensi. Imagu, kio okazos, se milionoj da ĉinoj fuĝos al Eŭropo, kiam ili ne plu eltenos la politikan premon en sia patrujo! Certe, ankaŭ la homamasoj en tiuj landoj strebas al emancipiĝo kaj libereco kiel ĝi ekzistas en Okcidento, kiel montras la ekzemplo de Hongkongo, kies loĝantoj sentas sin krude ĉikanataj de la pekinaj maoistoj, ĉar ili postulas bazajn liberecojn. Se la Okcidento restos honesta, ĝi ne povos akcepti nek toleri tiajn farojn (kvankam ankaŭ la Okcidento ne estas anĝelo), malgraŭ pli kaj pli intensa kunlaboro kun Ĉinio. Alia problemo de la grandpotencoj estas, ke ili investas gigantajn sumojn en la rearmadon kaj produktadon de (pli efikaj) armiloj. En Filipinoj, kie kruda perforto servas kiel integra parto de la ŝtata doktrino (aŭ moralo), furiozas sovaĝa ŝtatestro, kiu publike alvokas al amasa mortigo de krimuloj kaj kontraŭuloj (ŝajnas, ke tiu prezidento komplete forgesis, ke ankaŭ krimuloj havas homajn rajtojn kaj ne povas esti ĉasataj kiel kunikloj). Nature, Ruslando tuj liveras armilojn, se Duerte mendas ilin, kaj la samon faros Usono. En Venezuelo evoluas procezo, kiu povas konduki al anarkio kaj diktaturo de „kanajla“ ŝtato – cetere je la granda plaĉo de Putin kaj konsortoj, kiuj volonte apogas tiajn kubecajn reĝimojn en tiu regiono, ĉar ili kaŭzas malpacon kaj malstabilecon en la okcidenta hemisfero. En Hispanio la ŝtata polico krude atakis pacajn manifestaciantojn kaj rigore persekutas aŭtonomismajn politikistojn de Katalunio, kiuj postulas la sendependecon de sia lando, tiel ke la katalunoj sentis sin reĵetitaj en faŝismajn tempojn. En praktike ĉiuj landoj la polico pli kaj pli brutale kaj bone ekipite reagas kontraŭ (pli malpli) pacaj manifestaciantoj kaj protestantoj, eĉ en Germanio kaj Svislando, ĉiam kun la beno de la registaroj kaj pli malpli ĉiuj politikaj partioj, ankaŭ maldekstraj. Pri la kruda, brutala perforto en la islamaj kaj arabaj landoj ni tute ne parolu, ĉar tie la demokratio ŝajne totale fiaskis (sed ne pro la kulpo de la Okcidento), kvankam okazas ŝajnbalotoj, kiuj donas al la homoj la alternativon elekti nur inter friponoj, kiuj celas kaj vigle praktikas la lezadon de la homaj rajtoj. En Sirion enmiksiĝis Usono, Ruslando kaj Irano. Bele, perfekte, ĉu ne! La t.n. Islama Ŝtato

povis esti forpuŝita, sed Asad, subtenata de la rusoj, daŭre restis kiel reganto, kvankam la siria popolo volis liberiĝi de li. Putin, la klasika subpremanto de la homaj rajtoj, estas prezentata kiel pacanĝelo, kiu meritis la nobelpremion. La kulmino de la cinika perforto estas verŝajne atingita en norda Koreio, kiu estas la plej lasta stalinisma prizono en la historio de la homaro, kie la homoj vegetas kiel pupoj kaj marionetoj, al kiuj praktike ĉio estas malpermesata, eĉ la rajto esti bone nutrita, kaj kie ekzistas teruraj punkoncentrejoj, al kiuj oni sendas ĉiun civitanon, kiu esprimas kritikan opinion. Laŭ la indikoj de homrajtaj asocioj, en tiaj prizonoj vivas ĉirkaŭ ducent mil homoj. Sed la turisma propagando estas fortega kaj efike influas la vizitantojn tiel, ke ili trovas nordan Koreion ege plaĉa, dum la freneza ŝtatestro en Pjongjango, por kiu kelkaj eĉ havas komprenon, ne hezitas minaci la mondon per apliko de nukleaj armiloj. Jen kelkaj plej krudaj ekzemploj inter multegaj.

Sendube, Ĉinio, Rusio kaj la Okcidento, precipe Usono, montras sin solidaraj, se temas pri ekonomia ekspluatado kaj politika-socia subpremado. En tiu rilato ili estas parencaj kaj ne diferencas unu de la alia, kvankam ili estas senkompataj malamikoj, se temas pri konkurenco rilate al ekonomio, geopolitiko kaj socia sistemo. Tiuj grandpotencoj regas la mondon, ĉar ili posedas la povon, la resursojn kaj la necesajn armilojn por timigi, minaci kaj ĉantaĝi aliajn ŝtatojn kaj popolojn, kiuj pli kaj pli plene dependas de ili. La pacalvokoj de organizaĵoj kiel Unuiĝintaj Nacioj signifas nuran superfluan kaj ĝenan balaston kaj estis krude ignorataj aŭ misuzataj laŭ propra maniero, kiel en la kazo de Rusio en Sirio. Al la Homrajta Konsilio de UN mem apartenas tiaj ŝtatoj kiel Ĉinio, Pakistano, Afganio, Kataro, Saŭdarabio, Angolo, Egipto, Irako, Hungario, Kubo, Brazilo, kiuj estas konataj pro tio, ke ili konstante, sisteme kaj mallice lezas la homajn rajtojn en granda stilo. Antaŭ nelonge Grekio evitis per vetoo, ke EU kritiku en la Homrajta Konsilio de UN la malboniĝon de la situacio de la homaj rajtoj en Ĉinio. En alia kazo Grekio kaj Hungario nebuligis deklaron de EU, post kiam la Konstanta Kortumo en Hago proklamis la teritoriajn pretendojn de Ĉinio en la Sudĉina Maro malkonforma al la valida juro.

Diversaj neregistaraj organizaĵoj kaj homrajtaj asocioj aŭ reprezentantoj de etnaj kaj religiaj minoritatoj pli kaj pli negative reagis kaj plendas pri la priskribita evoluo kaj protestas kontraŭ la lezado de la homaj, civilaj kaj civitanaj rajtoj en la koncernataj landoj. La regantoj en tiuj landoj kutime akre reagis kontraŭ kritiko flanke de tiuj organizaĵoj, krude malpermesas al ili esplori la surlokajn situacion aŭ subpremas kaj forpelas iliajn aktivulojn aŭ eĉ enprizonigas ilin. Ĉiuj supre menciitaj ŝtatoj de la Homrajta Konsilio de UN konas tian praktikon. La kulmino de la ciniko estas, ke tiuj regantoj asertas, ke en iliaj landoj la politika procezo evoluas tute kongrue kun la internaciaj normoj kaj ke la homaj rajtoj estas respektataj. Ĉiuj tiuj potenculoj palavras pri demokratio, pri kiu ili komprenas kion ili mem volas kompreni. Eĉ en Svislando, kiu ĝenerale havas ĉi-rilate altnivelan standardon, oni reagis nerveze, kiam la Homrajta Konsilio de UN kritikis iujn defecitojn ĉe la homaj rajtoj, ekzemple toleradon de rasismo kontraŭ migrantoj, de diskriminacio kaj perfortado de virinoj kaj de misfamigaj kaj minacaj predikoj de radikalaj islamistoj kontraŭ anoj de aliaj religiaj kredoj, kaj donas rekomendojn kiel oni povus plibonigi la protekton de la homaj rajtoj.³

Esperanto-movado kaj Homaj Rajtoj

Kvankam la internacia Esperanto-movado ne estas klasika homrajta organizaĵo, en la statutoj de Universala Esperanto-Asocio kaj de ĝiaj landaj kaj fakaj asocioj ekzistas artikolo, kiu emfazas la gravecon de la respektado de la homaj rajtoj en la senco de la Universala Deklaracio

³ Vd. <https://www.derbund.ch/schweiz/standard/rassismus-in-der-schweiz-bereitet-unomitgliedern-sorgen/story/16658407> kaj https://www.swissinfo.ch/ger/uno_menschenrechte-in-der-schweiz--vorsicht-diskriminierung-/43663610.

de la Homaj Rajtoj (1948). Samtempe, la UEA-sistemo deklaris sin neŭtrala rilate al politikaj demandoj, kio kaŭzis, ke ĝi silentas pri la lezado de la homaj rajtoj en tiuj landoj. Per tio ĝi falis en gravan dilemon, ĉar en la praktiko tio signifas, ke la neŭtrala Esperanto-movado ne povas kritiki ŝtatojn, kie la homaj rajtoj estas lezataj. En la pasinteco tio signifis, ke UEA ne kritikis la lezadon de la homaj rajtoj en komunismaj kaj triamondaj landoj, kie tiuj rajtoj estis perpiede tretataj en granda stilo. Estas kurioze, ke tiu problemo koincidis kaj koincidas kun landoj, kun kiuj UEA plej multe simpatias kaj kun kies registaroj ĝi ŝajne havas aŭ volas havi bonajn rilatojn, ĉar ili simpatias kun Esperanto kaj ŝajne apogas la Esperanto-movadon. Ĉefaj tiaj kazoj estas Ĉinio, Kubo, Vjetnamio, kie la homaj kaj civilaj rajtoj estas baze kaj sisteme lezataj en granda stilo, sed la Esperanto-movado simpatias kun aro da tiaj landoj en „oriento” kaj „suda”, al kiuj estas komune, ke ili aplikas kontraŭ-okcidentan sintenon.

Ĝis nun mi ne aŭdis proteston en Esperanto-medioj kontraŭ tiuj faroj kaj praktikoj, dum daŭre aperas malbelaj artikoloj ekzemple kontraŭ Barack Obama, kies politika sinteno estis eĉ pli maldekstra ol kelkaj deziris, kaj kiu cetere estis nobelpremiito pri paco, kion li ja vere meritis. La Esperanto-movado silentas ankaŭ pri la lastatempa dubinda politika evoluo en Pollando kaj Hungario, du „klasikaj” landoj de Esperanto. En tiuj landoj regas potenculoj, kiuj akre kraĉas sur la principojn de la humaneco kaj traktas rifuĝintojn pli malbone ol bestoj. En Hungario oni celas instali „malliberalan” sistemon kaj en Pollando oni intencas aboli la validan konvencian juron, tiel ke ĝi ne plu kongruu kun la eŭropaj normoj. La malbela lastatempa historia kampanjo de la Kaczyński-reĝimo kontraŭ Germanio, kiun tiu lando devas elteni sen merito, estas strikte prisilentata. Ĝis nun mi ne legis, ke polaj aŭ hungaraj esperantistoj protestis kontraŭ tiuj faroj. En Ruslando eĉ aperis grupo de esperantistoj, kiuj publike admiras la dubindan politikon de Putin kaj apogas la anekson de Krimeo.⁴ Ŝajnas, ke tiuj homoj nenion lernis el la pasinteco, kiam ili pugolekis ankaŭ la potenculojn de la komunisma reĝimo ĝis 1989. La historio de la Esperanto-movado montras, ke tiu movado flatis ĉiujn eblajn potenculojn, sendepende de tio, ĉu dekstraj aŭ maldekstraj, se ili montris iun plaĉon aŭ simpatian al Esperanto. Kvankam la gvidantoj de UEA bone konsciis kaj konscias pri la politika situacio en tiuj landoj, ĝi restas silenta kaj indiferenta kaj pasive kunludas la ludon. Plej groteske kaj hipokrite tiu ludo estis siatempe ludita dum la komunisma tempo en Bulgario, Hungario, Pollando kaj GDR, kies ŝtataj reĝimoj uzurpis la ideojn de Esperanto por la propra politika propagando kaj misuzis la tieajn Esperanto-movadojn kiel kunludantojn kaj apogantojn, kaj certaj esperantistoj en tiuj landoj volonte lasis sin misuzi.⁵ Pro tio la Esperanto-movado estas politike parte diskreditita en tiuj landoj, ĉar ĝi ludis la rolon kiel lojala komplico de la komunistoj, kvankam nur malmultaj homoj konas tiun politikan kuntekston, ĉar ili scias nenion pri la historio de Esperanto, precipe ekster tiuj landoj kaj la junaj generacioj en tiuj landoj.

Ekzemple, la esperantistoj ankoraŭ freneze aplaŭdis la bulgaran komunisman reĝimon, kiam la komunistoj en Sofio mistraktis turkojn, pomakojn kaj ciganojn kaj ofendis makedonojn, temis pri skandaloj, pri kiuj hodiaŭ neniu plu parolas. La krimoj faritaj kontraŭ la menciitaj minoritatoj kaj etnanoj neniam estis punitaj (ĉar ili kongruis kun la leĝoj de tiuj ŝtatoj), kaj la orienteŭropaj komunistoj povis forlasi la mondan scenejon sen esti jure punitaj. Ankaŭ la Esperanto-gazetaro de la Orienta Bloko kiel ekzemple la revuo *Bulgara esperantisto* strikte subpremis ĉi tiujn temojn, kiuj estis strikte tabuitaj, kaj anstataŭ tio preferis senlime kaj ĝis eksceso glorejadi la komunisman partion. Precipe en la plej lasta fazo de ĝia ekzisto, la UEA-movado admiregis kaj laŭte laŭdegis la bulgaran Esperanto-movadon kiel grandiozan aferon, kiel gravajn sukcesojn kaj atingojn por Esperanto, grandparte ekster la konscio kaj en blindeco,

⁴ Vd. http://www.plansprachen.ch/Esperanto_adacta_2015.pdf, ĉap. 10.

⁵ Tion mi montris en mia ampleksa studo „Pro et contra Esperanto. Plansprachen-Bewegung in Russland, der Sowjetunion und Osteuropa zwischen Wissenschaft, Politik und Gesellschaft” sur www.planlingvoj.ch.

ke la „sukceso” de tiu bulgara Esperanto-movado baziĝis sur sia statuso kiel integra parto de (krima) politika sistemo (kiu sin mem konsideris prava, humanisma kaj pacama), kiu misuzis tiun movadon por politikaj celoj kaj subpremis ĉiun voĉon, kiu kritikis la politikan reĝimon aŭ la socialismon mem (kiun multaj esperantistoj en Okcidento naive admiregis). Pri tiuj esperantistoj (verŝajne pli ol oni povas supozi), kiuj en la nomo de ŝtataj sekretaj servoj prispionis la Esperanto-movadon en siaj landoj, mi tute ne parolu, ĉar tiu temo daŭre estas strikta tabuo kaj restis neprilaborita, ĉar neniu volas okupiĝi pri tio. Ĉar la Esperanto-movado celas esti senmakula, ĝi simple prisilentas ĉiujn tiujn aferojn kaj problemojn.

La Esperanto-movado eĉ ne rimarkis, ke ĝi falis en la kaptilon de la komunisma propagando, kies agentoj uzurpis la ideojn de Zamenhof, tiel granda kaj senlima estis la entuziasmo. Neniu gvida esperantisto, kiu agis en la nomo de la komunisma partio, senkulpiĝis ĉe la viktimoj, t.e. la simplaj asociaj membroj, kiuj troviĝis sub enorma politika premo kaj ne povis aŭ kuraĝis levi sian voĉon kontraŭ la komunisma monopolo kaj kontraŭ la sistema MALJUSTECO, kiu regis en tiuj komunismaj landoj, ĉar en tia kazo oni povis esti jure persekutata, politike silentigita aŭ deklarita freneza.⁶

Konsiderante ĉiujn tiujn faktojn kaj facetojn, oni devas veni al la konkludo, ke la Esperanto-movado estas kontraŭ-zamenhofa movado, ĉar L.L. Zamenhof neniam apogis komunismon aŭ diktatorajn ŝtatreĝimojn, kiuj lezas la homajn rajtojn, kaj neniam polemikis kontraŭ Usono aŭ la angla lingvo, ne parolis pri imperiismaj lingvoj, ne havis antisemitismajn sentojn (mem estante judo kun kritika menso) kaj ne malŝatis kapitalistojn aŭ aliajn etnojn kaj homojn, kiel la postaj esperantistoj praktikadis, cetere ne nur en la komunismaj landoj. Ĉiuj tiuj cirkonstancoj kaŭzis, ke la Esperanto-movado, kiu nemezureble supertaksis sian signifon por la paco kaj justeco, neniam ricevis la nobel-premion pri paco, prave.⁷ La vero estas, ke la Esperanto-movado faris neniun realan, kredindan kontribuon al la monda paco, sed esence simpatiis kun krimaj reĝimoj, kiuj grandstile lezis la homajn rajtojn, gravis, ke ili iel apogis Esperanton kaj esprimis kritikon kontraŭ Usono kaj la Okcidento. La Esperanto-movado defendis neniujn etnajn minoritatojn, kiuj estis minacataj de la potenculoj, kiujn la esperantistoj admiris, de judoj dum la holokaŭsto kaj indianoj en Ameriko ĝis bosnianoj dum la jugoslaviaj militoj, ktp. La Esperanto-movado montras ankaŭ neniun solidarecon kun la katalunoj, kiuj iam havis fortan Esperanto-movadon. La Esperanto-movado troviĝis ĉiam sur la flanko de la potenculoj, ĝi admiris kaj adoris Lenin, Stalin, Maon, Titon, Fidel Castron, eĉ Hitleron kaj Ĥomejni, dum la subpremataj kaj persekutataj komunumoj estis ignorataj. Laŭ tiu logiko la Esperanto-movado certe ĝojus ankaŭ pri la reĝimo en Mjanmaro, se ĝi apogus Esperanton, malgraŭ la kruda persekutado de la popolo de la Rohinjoj, kiu okazas nuntempe en tiu lando antaŭ niaj okuloj. Do, la tuta formala palavrado de la Esperanto-movado pri justeco, paco kaj homaj rajtoj estas ridinda, embarasa, baze malhonesto, komplete sensenca kaj absurda kaj devas esti konsiderata kiel nura propaganda truko por pravigi la ekziston kaj neceson de la lingvo Esperanto.

Nature: Mi argumentas el „okcidenta, eŭropa, liberalisma“ vidpunkto, el la „klasika“ perspektivo de la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj kaj konkludas, deduktas la aferojn el tiuj vidpunkto kaj perspektivo. Tamen, la principoj de tiu deklaro devus esti valida por

⁶ Tio okazis ekzemple al Marija Taŝeva en Bulgario, kiu kuraĝis kritiki la burokratian sistemon de BEA en 1987 (vd. mian studon sub http://www.plansprachen.ch/Esperanto_Bulgarien.pdf (p. 145, germanlingva).

⁷ Se la itala sekcio de Amnestio Internacia donis iun (cetere sensignifan) „homrajtan“ premion al Itala Esperanto-Federacio, pri kio la Esperanto-gazetaro fanfaronis (vd. <http://sezonoj.ru/2017/11/italio-4>), tio devas esti konsiderata kiel pura farso, ĉar oni povas dubi, ke Itala Esperanto-Federacio havas iun realan meriton por la homaj rajtoj. En la repaĝaro de AI Italia kaj de IEF mi trovis neniun sciigon pri tiu premia aljuĝo.

⁸ Laŭdindan rolon ludis IKEL kun ĝia gazeto *Emismo*, kiu faris utilan informan kaj klerigan laboron.

ĉiuj ŝtatoj kaj popoloj. Rusoj, ĉinoj, araboj, kubanoj, vjetnamanoj, filipi-nanoj, poloj, hungaroj, turkoj, komunistoj, naciistoj, radikalaj maldekstruloj, ekstremismaj dek-struloj, islamistoj, k.a. eble povas vidi la menciitajn principojn kaj detalojn laŭ aliaj vidpunkto, perspektivo kaj argumentoj, kiujn oni povas aŭ konsideri aŭ ignori. Tamen: Se la Esperanto-movado ne volas aŭ ne povas enmiksiĝi en la politikajn aferojn de la unuopaj ŝtatoj, ĝi almenaŭ serioze konsideru la problemojn de la homaj rajtoj kaj la etnismajn demandojn, kiuj estis supre aluditaj, ĉar tiuj temoj estas esence kaj nedisigeble ligitaj kun la zamenhofaj ideoj kaj idealoj, la esperantismo kaj homaranismo.⁸

Sed al mi ŝajnas, ke la esperantistoj tute ne (plu) interesiĝas pri tiaj aferoj, temoj kaj problemoj. La Esperanto-movado, kiu timas la totalan signifoperdon de sia afero kaj la drastan ŝrumpadon de sia komunumo, estas plene okupata pri siaj asociaj problemoj. Temas pri movado, kiu per amoka aktivismo kaj dubinda propagando klopodas defendi siajn honoron kaj signifon, kio estas reflektata en la malmultaj Esperanto-gazetoj, kies raportoj praktike neniu plu interesas, malgraŭ konstanta fanfaronado pri sukcesoj kaj progresoj de Esperanto.

La problemoj de la Esperanto-movado, kiu ĉiam havis grandan malfacilon toleri kaj elteni siajn kritikantojn kaj kontraŭulojn, kvankam ĝi senĉese predikadis toleremon, estas, ke ĝi estas ĉefe propaganda, turisma kaj amuziga. Al ĝi mankas seriozeco kaj substanco. Do, la Esperanto-movado riskas fariĝi kompleta farso. Kaj antaŭ la homaj rajtoj la Esperanto-movado plene kapitulacis.

Ĉi tiu kontraŭdira situacio, nome ĝia baza ideologia kaj politika malhonesteco rilate la Homajn Rajtojn, kaj ĝia unuflanka maldekstra orientiĝo, igis min forlasi la Esperanto-movadon, ne ĉar mi estus ideologia dekstrulo, sed ĉar mi ne plu eltenis la politikan falsecon de tiu movado. Mi kredas, ke kun siaj strategio, 'politiko' kaj sinteno, kiujn ĝi aplikis en la pasinteco fakte ekde la komenco de sia ekzistado, nome la strategio de la vana konvinkado kaj senutila propagando laŭ sektema maniero, la Esperanto-movado plene kaj definitive fiaskis (kvankam dum la komunisma periodo ĝi ŝajnis „venki“) kaj ke ankaŭ estonte ĝi atingos nenion gravan, esencan aŭ konkretan en sia senco kaj laŭ sia celaro. Pro tio *tia* Esperanto-movado ne estas apoginda fare de la politiko kaj homaro, tiel longe ke ĝi ne fariĝos honesta, kredinda kaj serioza movado kaj ne ĉesas simpatii kun la supre menciitaj politikaj tendencoj kaj fortoj.

Andreas Künzli, novembro 2017